REGO
RANO

Estis iam belega princino.

Dum sunaj tagoj ŝi sidis sur bordo de puto kaj ludis per ora globo, ŝi ĵetis ĝin alten kaj poste ĝin kaptis.

**Sed foje ŝi miskaptis,
globo falis en puton
kaj rapide dronis
en nigra profundo.**

**Princino
ege malgajis
kaj
laŭte ploris,
ĉar ora globo
estis ŝia
plej ŝatata ludilo.**

**Subite elakviĝis
dika,
malbelega rano
kaj diris:**

**„mi redonos al vi
vian globon,
se vi min akceptos
kiel amikon,
se vi permesas,
ke mi
povas manĝi
el via telero
kaj dormi
en via lito.**

Haste ŝi respondis:
„mi ĉion promesas!

Redonu al mi
mian globon!”

Rano tute profunde
subakviĝis
kaj redonis
oran globon
al princino.

**Knabino
transprenis globon
kaj ĝoje forsaltis.**

**„Atentu!“
vokis rano.**

„Kunprenu min!“

**Sed knabino
ne aŭskultis
kaj jam forgesis
sian promeson.**

Postan tagon sidis
ĉirkaŭ tablo
reĝo kun sia filino
kaj kun multaj
korteganoj.

Subite oni aŭdis
frapojn
je palaca pordo.

Estis rano,
kiu vokis:
“princino,
plej juna,
malfermu
por mi pordon.”



**Ekvidinte ranon,
princino ektimite
klakfermis pordon.**

**Sed reĝo demandis,
kion rano petis,
princino
devis konfesi,
ke ŝi promesis sian
amikecon al rano.**

**„Promeson
oni devas plenumi!**

**Malfermu pordon
por ĝi!“,
ordonis reĝo.**

**Pro tio princino
naŭze enlasis ranon,
kiu postsaltetis ŝin
ĝis ŝia seĝo.**

Post iio
rano aranĝis,
ke ŝi levis ĝin
sur tablon
kaj petis:

„ŝovu pli proksimen
vian oran teleron,
pro kio ni komune
povas manĝi.

Nur malvolonte
princino tion faris.

Post kiam rano satiĝis,
ĝi diris:
“mi dormemas.

Aranĝu
vian silkan litaĵon,
ni enlitiĝu!”

Princino naŭzis
kaj laŭte ploris.

Reĝo kolere diris:

**„kiu helpis al vi,
tiun vi
ne malrespektu!“**

**Princino
per du fingroj
portis ranon
en ĉambron.**

**Sed kiam rano
vere postulis,
dormi kun ŝi
en lito,
princino ege koleriĝis
kaj plenforte ĵetis
ranon kontraŭ muron.**

Falante de muro,
rano subite
transformiĝis
al belega princo.

Malbonega magio
ensorĉis lin
kaj nur tiu princino
kapablis
liberigi lin el sorĉo.

Plenĝoje
reĝo geedzigis ambaŭ.

Postan matenon
venis luksa kaleŝo,
tirita
de ok blankaj ĉevaloj
por veturigi ilin
al princa palaco.



La fidela Henriko,
servisto
de juna princo,
siatempo
pro granda malĝojo
ligis sian koron
per tri feraj ringoj
pro ke koro ne
disrompiĝu.

Sed nun servisto
tiom feliĉis,
ke unua ringo per
laŭta krako disfalis.

„Henriko,
kaleŝo disrompiĝas!“
vokis princo,

„Ne, princa moŝto,
ne estas kaleŝo!”

Kaj denove
kaj poste trian fojon
krakante disrompiĝis
feraj ringoj de koro,
ĉar servisto
plenis pro ĝojego,
ĉar lia princo liberiĝis
de sorĉo
kaj nun
kiel edzo feliĉas.

i e

fino